Malafakte, ni povas certigi ke, ĵus ĉirkaŭ la tempo de tiu kongreso, kiam en iu popola pariza teatro la parodisto Schwartz demandis al la publiko « ĉu iu el la aŭskultantoj konas Esperanton ? » proksimume 200 personoj levis la manon.

*
* *

Kiam ekmontris sin la nuntempa bicikleto sur la bulvardoj de la urbo, la dudek komizoj de la komercisto Ponjono treege pridiskutis la valoron de la nova elpensitaĵo.

Ian lundon matenon, la kasisto Telop alvenis biciklete antaŭ la oficо kaj rakontis pri la bela bicikleta ekskurso, kiun li faris la antaŭan tagon sur la kamparo, pri la rapideco, je kiu li revenis de Meĥleno al Antverpeno, k.t.p.

Iom post iom la komizoj de S-ro Ponjono aĉetis bicikleton, ĝis fine ĉiu posedis elegantan maŝinon, — ĉiuj krom 6) la junaj Riksko kaj Fiksko, kiuj loĝis en malriĉa antaŭurbo 7) kaj ne enspezis sufiĉe por fari tian grandan elspezon 8).

Ho ! kia ĝojo por la oficistoj ! Oni ekskursis pare, are, familie, al la kamparo, al aliaj urboj, al Ardenlando, al Germanujo !

Tio estis la situacio antaŭ 14 ĝis 15 jaroj. — Kaj nun ?

Nun, nur du Ponjonaj komizoj ankoraŭ bicikletveturas : Riksko kaj Fiksko, kiuj aĉetis okaze bonan malnovan maŝinon, per kiu ili venas al la oficо preskaŭ ĉiutage.

Tamen la nombro da bicikletistoj senĉese pligrandiĝis. Sed rimarku ke en tiu nombro ĉiam ekzistas du specoj da sportistoj : la aro da bicikletonamantoj kaj la aro da praktikemuloj....

Tiun rakonteton mi raportis por vidigi vin, ke ankaŭ en la movado por la tutmonda lingvo ekzistas du grupoj : la lingvonamantoj (amasego) kaj la praktikemuloj (ĝis nun nur areto).

Nu, neniel senkuraĝiĝu, ĉar vi vidas ke kelkaj fervoruloj de la lasta jaro forlasis la vicojn : estas nepra okazontaĵo en ĉiu movado ; ilin anstataŭas aliaj lingvonamantoj.

Sed atentu precipe pri la praktikemuloj : ili estas la Rikskoj kaj Fikskoj de nia movado, ili devas igi la forton de Esperanto !

Direktu do vian propagandon al tiuj personoj el via socia rondo, kiuj povos tiri profiton el la praktika uzado de Esperanto, kiuj pro sia profesio enspezos aŭ ĝuos plie per peresperanta komuniko kun ĉiaj fremdlandanoj ; alivorte, varbu *komercistojn, maristojn, artistojn, inĝenierojn, maŝinistojn,* k.t.p.

Pligrandigi tiun aron da praktikemuloj, tiun kernon da Esperantistoj : jen, novuloj, via celo.

La dato de la tutmonda kongreso de Antverpeno alproksimiĝas : ni senhalte laboru ĉiuj por tiu nova triumfo de Esperanto !

SKALDO.

---

*Klarigoj* : 1) bonaĵo, weldaad, bienfait ; — 2) plenumi, vervullen, accomplir ; — 3) pruvi, bewijzen, prouver ; — 4) donaci, beschenken, faire cadeau de ; — 5) vana, ijdel, vain ; — 6) krom, buiten, sauf ; — 7) antaŭurbo, voorstad, faubourg ; — 8) elspezo, uitgave, dépense.



# HUMORAĴOJ

### AŬTUNO, PRINTEMPO

Estis aŭtuno, la tagoj mallongiĝis, la vetero fariĝis pluvema, kaj la vento disblovis la foliaron, falantan de la arboj.

Sur la kamparo preskaŭ la tuta laboro estis finita kaj la farmmastro nur serĉis pretekston por forigi sian serviston.

— Rigardu, li ekkriis, jen leporo kiu kuras sur la tegmento !

— Ne estas leporo, mastro, estas kato !

— Se vi ne diras, ke estas leporo, mi eksigas vin !

— Estas leporo, diris la servisto.

Printempo estis alveninta, la ĉielo heliĝis kaj bluiĝis, kaj se estis multe da laboro sur la kamparo, ne estis sufiĉe da laboristoj por ĝin kulturi.

— Vidu, diris la servisto al la farmmastro, jen kato, kiu kuras tra la trifolikampo !

— Vi eraras, estas leporo !

— Se vi ne diras ke estas kato, mi tuj forlasos vin.

— Estas kato, diris la farmastro.

### MALSAMA

Tine, mia servistino, tranĉis en sian dikan fingron kaj montris la vundon al la laktvendisto.

— Estas nenio, diris tiu ĉi. Sed se la vundo estus okazinta tie ĉi — li montris sian mezan fingron — estus estinta pli grava !

— Kaj kial ?

— Car tiam, mi mem sentus la doloron, respondis malice la laktvendisto.

### ENVIPLENA

Ŝi. — Kial vi ne edziĝas ? Cu vi ne estas sufiĉe aĝa ?

Li. — Ho, jes !

Ŝi. — Ĉu vi ne estas sufiĉe riĉa ?

Li. — Ho jes !

Ŝi. — Nu ?

Li. — Mi ne estas sufiĉe freneza.

Ŝi, — Bona Dio ! Kiel freneza vi do devas esti ?

---

# PROBLEMOJ (1)

1. — **Logogrifo-Metagramo**. Respektinda virino. — Sanĝu ŝian koron, vi trovos nutraĵon precipe por bestoj. — Forprenu ambaŭan kapon, vi havos agrablan trinkaĵon kaj ian agadon.

2. — **Enpenetriĝintaj vortoj**. Tiujn ĉi dekunu grupojn da literoj ordigu tiamaniere, ke, kuniĝinte kaj anagramiĝinte la literojn de la 1a, 2a, 3a, grupo ; poste tiujn de la 2a, 3a, 4a ; poste de la 3a, 4a, 5a, k. t. p. ĝis la 9a, 10a, 11a, vi trovu naŭ vortojn (substantivoj) signifantajn : malbonvola sento — metala bildo — malbona diaĵo — monero — nobela titolo — ligna ujo — skribitaĵeto — kara infano — idolaĵo.

---

(1) Oni sendu la solvojn antaŭ la 15a de Septembro al *S*-ro **Fr. Schoofs**, sekretario de la Redakcio 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen (49, rue de la Pte Ourse. Anvers). Prefere skribitajn sur poŝta karto. Oni povas ankaŭ sendi la solvojn de la antaŭe aperintaj problemoj.

En la lasta numero de la 2a jarkolekto ni publikigos la nomojn de la solvintoj. Oni povas respondi pseŭdonime.

Belaj premioj estos aljuĝataj.

anto moeten gestuurd worden is : Edwin C. Reed, Chamber of Commerce, Washington, D.C. Goddelijke diensten in Esperanto zullen tijdens het congres in al de kerken van Washington plaats hebben.

**ZWEDEN** — Eerlang zal een esperantisch tijdschrift in dit land verschijnen onder den titel van «Sveda Esperantisto, organo de la Sveda esperantista federacio.»

De inschrijvingslijst zal bedragen Sm. 1,40. Adres der redactie : John Lundgren, te Hedemora, Zweden.

Een hartelijk welkom aan onzen nieuwen confrater !

d'Esperanto à M. Edwin C. Reed, Chamber of Commerce, Washington. D.C. Des services divins en Esperanto auront lieu pendant le congrès dans toutes les églises de Washington.

**SUÈDE**. — Sous peu paraîtra dans ce pays une revue espérantiste sous le titre : « Sveda Esperantisto, organo de la Sveda esperantista federacio. »

L'abonnement coûtera Sm. 1.40. Adresse de la rédaction : John Lundgren, à Hedemora, Suède.

Une cordiale bienvenue à notre nouveau confrère !

## NOVA ĴURNALO

Antaŭ nelonge aperis la unua numero de **Esperanto et Croix-Rouge**, monata organo de la « Société française Esperanto-Croix Rouge », kies nobla celo ĉiuloke estas konata.

Ni insiste konsilas nian legantaron ĝin aboni, aŭ prefere aliĝi la societon.

La abonprezo de la revuo, (20 × 13) 26 paĝoj, estas nur unu franko ; la jara kotizo de la aktivaj membroj de la societo estas minimume fr. 2.50. AM.

## BIBLIOGRAFIO

« Belga Esperantisto » nur recenzas pri la verkoj senditaj al ĝi en du ekzempleroj. (Adreso : Arendstraat, 26, Antwerpen.)

I. **Presa Esperantista Societo**, 35, rue Lacépède, Paris.

A) *Dictionnaire esperanto-français*, avec préface de EM. ROBERT, (15 × 8) 362 paĝoj. Prezo : broŝurita Fr. 2 = Sm. 0.8, bindita Fr. 2.50 = Sm. 1.—.

Tiu vortaro estas unu el la plej rekomendindaj. Ĝi enhavas ne nur la vortojn troveblajn en la Universala Vortaro kaj tiujn alprenitajn de la Akademio, sed ankaŭ multnombrajn pliajn, trovitajn en la esperantista literaturo, sume 21.470.

B.) D-RO CORRET. — *Raporto pri la kvina esperantista kongreso*, (13 × 21) 72 paĝoj. Prezo Fr. 0.75 (Sm. 0.40).

Tiu verketo, eltirita el « Lingvo internacia » donas plenan, klaran raporton pri la Barcelona kongreso kaj sendube tre interesos ĉiujn samideanojn. Ĝi ne estas nur raporto, sed ankaŭ kritika pristudado de ĉiuj esperantistaj kongresoj, kaj ĝia aŭtoro ne timas fari kelkfoje kritiketon. Tutprave D-ro Corret insistas sur la fakto ke Esperanto ne estas plu projekto : « ĝi estas vivanta lingvo kaj ĝi povas evolui nur kiel la aliaj vivantaj lingvoj ». Tio estas eble la plej grava leciono de la kvina kongreso.

C.) PORUKS. — *La vakciniuja krono*, esperantigita de P. KIKAU (13 × 20) 30 paĝoj. Prezo : Fr. 0,50 = Sm. 0,20.

Jen iom post iom, dank'al Esperanto, la verkistoj de la plej malgrandaj lingvaj regionoj akiras grandnombran internacian legantaron. S-ro Kikau indas dankon, ĉar li konatigis la esperantistaron kun latva verko. Mi ĝin legis kun plezuro kaj gratulas la tradukinton pro lia bonega laboro.

III. **Librairie de l'Esperanto**, 15, rue Montmartre, Paris.

BEAUMARCHAIS. *La Barbiro de Seviljo*, esperantigita de SAM. MEYER. (17 × 11) 63 paĝoj. Prezo : ne montrita.

Bonega traduko, farita de lerta kaj konata esperantisto, de la fama komedio de Beaumarchais. Tiu verko estas nepra pliriĉigo de la esperantista libraro. AMATUS.